

Mi multe eraras aŭ mi estis en S.R. la unua uzanto de la „nova prepozicio“ far. D-ro Hamming en sia tre interesa konteoria studo (S.R., 2 2) proponis la „aspon“ far; li ne uzis la vorton far. Ĉiukaze jam de longe far estis proponita. Tiuj faktoj instigis min verki la jenan artikoleon.

**

La deirpunkto estas la Fundamento mem. En la dua regulo, laŭ la esperantlingva teksto de la Fundamenta Krestomatio, ni i.a. legas: „La ceteraj kazoj estas esprimataj per helpo de prepozicioj (la genitivo per *de* ...)“. Sed tiu regulo kolizias kun la sesa, kiu finiĝas per: „la prepozicio ĉe la pasivo estas *de*“.

Zamenhof konsiderante unuflanke la kutimojn en la naciaj lingvoj, aliflanke la multajn dubajn kazojn, kie oni ne scius, kiun tro precizan prepozicion uzi, opiniis pli saĝe havi saman ligvortojn por tiuj du rilatoj. En la simplaj kazoj ja ne povas ekzisti konfuzo: La ĉapelo de Petro; amata de ĉiuj.

Sed ekzistas pli malsimplaj kazoj, el kiuj la plej evidenta estas la komplemento de verbradika substantivo: la akcepto *de* la urbestro *de* la kongresanoj.

**

Zamenhof mem pli poste vidis la mankon, kaj kiam en 1906, sub premo de pliboniguloj li opiniis ke mem li devas proponi reformojn por limigiti danĝerojn li interalie proponis „novan prepozicion „*ab*“ (anstataŭ „*de*“) speciale por la pasivo“ (Leteroj de Zamenhof, 1, p. 253). Sur paĝo 316 ni legas ekzemplon: „li estas amata *ab* mi“.

La naciaj lingvoj fakte en pli malsimplaj okazoj kapablas uzi akcesorajn rimedojn. La klaro ordonas. Esperanto same apud *de* posedus *ab*, akcesora prepozicio.

Sajne tiu propono ne renkontis imitantojn. Male, estis proponitaj aliaj formoj. H. Sentis en „Kion bezonas Esperanto“ (1916) skribas sur paĝo 9:

„Por genitiva prepozicio, ni prenu la italan *di*, kaj por montri aganton post pasivaj verboj, la anke italan *da*. Tiam ni povas tute klare skribi: „akcepto *di* D^o Z. *da* l'urbestraro“, „vido *di* Blanka Monto *de* monto Salève“.

„tio estas expluato¹⁾ *di* homo *da* homo“, „vi kaŝiĝis *de* mi *da* li“, „jen monujo ŝtelita *da* Paulo *de* Johano“...“

Li preferas *da* antaŭ *par* proponita far aliaj, pro motivoj kiuj ŝajnas dubaj. Ekzemple li aludas la „eŭfonion“ de *da*: „*de* mi *da* li“ ne ŝajnas aparte belsona! Tiuj tri formoj *de*, *da*, *di* estis poste transprenitaj far Ido (ne: „*de* Ido“).

Cetere Camille Aymonier en sia verketo „Pri Esperanto - Diskutado pri kelkaj ŝanĝoj de Ido proponitaj“ (1913) skribas:

„Multaj esperantistoj jam proponis por la komplemento de pasiva verbo *par*, pli internacia ol *da*, kaj enregistrita de S-ro Grosjean-Maupin en lia vortaro. Kaj multe antaŭ la ekzisto de Ido, S-ro Sentis estis proponinta la diferencigon de *di* kaj *de*.“

Tamen ni aldonu, ke en la 9-a eldono (1938) de lia esperanto-franca vortaro *par* ne troviĝas. En la eldono 1913 de lia franca-esperanta, ankaŭ ne.

Par kolizias kun la bone konata radiko *par*. Same *da* kun la kvanta prepozicio („same *di* kun *di*“). Ili estis malbone elektitaj. Sed krome, same kiel *ab* kaj aliaj, ili estis fremdaĵoj, tro evidentaj neologismoj: estas granda diferenco inter terminara kaj gramatika neologismo! La unuan oni facile akceptas, la duan ne. Precipe se ĝi estas fremda. Ĝi prefere fontu el la propra havaĵo de la lingvo mem.

Sed ni legu la Plenan Gramatikon, 2-a eldono, 1938, p. 297, kiu resumas la evoluon de tiu klopodado trovi ĝustan gramatikilon.

„Apenaŭ menciindaj estas la mort-naskitaj proponoj de *par*, *da*, *baj*, ktp.: „ankaŭ la uzado de PER en tiu signifo estas eraro, ĉar PER montras la ilon, „la helpanton, ne la aganton.“

„Poste Z. iniciatis la uzon de FLANKE DE por tiu funkcio; sed, ĉar tiu „prepoziciaĵo povas ankoraŭ signifi „aparte de“ (t.e. preskaŭ la malon), la „solvo ankoraŭ ne estis kontentiga. Sed ĝi montris la vojon, kaj fine, en 1926, „Grosjean-Maupin konvinkis la SAT-gazetojn sisteme uzi, en tiu okazo, FARE DE, kiu enradikiĝis en la laborista literaturo: la ekspluatado de la „homo fare de la homo; dum vizito al nia sidejo fare de tiuj fremdaj kolegoj.“

„Dank'al la duobla anstataŭigo de DE jen per AL (PRI, ktp.), jen per „FARE DE, oni povas de nun eviti ĉian konfuzon kaj distingi ekzemple la „kondamno al la juĝisto disde la kondamno fare de la juĝisto.“

„RIM.I. Apud FARE DE oni jam uzis la formon FAR'DE, analogan al „DANK'AL; oni povus koncepti eĉ la prepozician uzon de la radiko FAR, „analoge al PER apud PERE DE: tio liverus tre oportunan formon por la „subjekta suplemento: la dediĉo de la preĝejo al San Mihelo far nia pastro.“

**

1) Mi ĝuste kopiis la tekston de Sentis: D^o, expluato.

Ni do vidas ke nur post longa tempo povis enradikiĝi la pure esperanta esprimo *fare de*. Ĝi nun plene apartenas al la lingvo. Ni tamen rimarku ke ĝi ne estas laŭfundamenta: tiu indikas *de*; ne: *fare de*. Laŭfundamentuloj eble kontentiĝis per la fakto, ke ĝi entenas *de*!!! Aŭ ke ĝi estas uzata nur en la „malsimplaj“ okazoj?

Krome *fare de* nepre tro pezas. Profesoro Lapenna en sia majstra verko „Retoriko“ uzis la pli belan formon *far'de*. Sed ankaŭ ĝi tro pezas. Esperanto estas eleganta lingvo en sia tuto. Ĝi elegantu en siaj detaloj!

Tial en la unua parto de mia traduko (S.R., 5, 8) mi uzis *far* anstataŭ *fare de*, sed nur post verboradikaj substantivoj. Mi iom rapide opiniis, ke tiel mi respektas la Fundamenton. Sed fakte mi ne respektis ĝin ... pli ol per uzo de *fare de*.

Fare de nepre apartenas al nia lingvo. Sed oni ne apogu sin per ŝajnargumentoj por diri, ke ĝi estas laŭfundamenta. Ni ne estu malalte laŭliteraj. Ni estu laŭspiritaj! Krome la lingvo nun estas multe pli bone reprezentata kaj defendata far ĝiaj verkistoj ol far la Fundamento. Ni respektu ĝin kiel maljunan patrinon kiu gvidis nin ĉe niaj unuaj paŝoj! Ni ne estu ties sklavoj!

Mi do ne plu havis motivon uzi jen *de*, jen *far*: en la dua parto de mia traduko (S.R., 5, 122), post afabla rimarko de nia Redaktoro, mi sisteme sen ia ajn „kaprico“ — uzis *far* por signi la komplementon de l' pasivo.

**
*

La komenca periodo de nia lingvo, ĝia infanaĝo forpasis. Ĝi iĝis matura. Ĝi libere paŝu sen katenoj: Ĝi plene konsciu pri sia libereco kaj ties limoj! Ege aplaŭdinda ĉi-rilate estas la artikolo de D-ro Hamming pri „lingvaj strukturoj“ (S.R., 6, 26). Krome kial timi? Se *far* — aŭ iu ajn alia nova vorto aŭ esprimo — estas efektive bona per si mem, ĝi trovos imitantojn. Se malbona, ĝi baldaŭ forgesiĝos. Kaj punkto. Polemikoj por aŭ kontraŭ estus nur balastoj.

LA TER-MAJSTRO.

(La lumbriko, la senlaca helpanto de la terkulturistoj)

de Muzea kuratoro C. STØP—BOWITZ.

Prelego en Internacia Somera Universitato, Oslo 1952.

Laiko ofte emas klasigi ĉiujn bestojn, laŭ tre subjektiva, homa vidpunkto, laŭ la grupoj de utilaj, malutilaj kaj tute indiferentaj bestoj. Sed ofte povas esti sufiĉe malfacile loki iun aŭ alian bestospecon en ĉi tiun skemon, ĉu pro tio ke la koncerna speco faras jen utilon, jen malutilon, laŭ la cirkonstancoj, ĉu pro tio ke oni scias tro malmulte pri ĝi; la lasta kaŭzo validas precipe por la pli primitivaj senvertebruloj.

Efektive ekzistas ankoraŭ homoj, kiuj zorge elprenadas la lumbrikojn el la tero, ne sciante ke ili tiel klopodas ekzili sian plej fidelan helpanton. Ĉar se iu besto sendube apartenas al la grupo de utilaj bestoj, tiu estas la lumbriko, aŭ la termajstro, kiel ĝi ofte estas nomata.

La lumbriko apartenas al la granda bestogrupa nomata *vermoj*, pli precize al la *anelidoj* aŭ *artikvermoj*, ĉar la tuta korpo konsistas el multaj, ĝis pluraj centoj, da mallongaj artikoj aŭ *segmentoj*, tiel ke la tuta besto ŝajnas konsistanta el mallarĝaj ringoj. La plej multaj anelidoj vivas en la maro, la lumbriko estas preskaŭ la sola reprezentanto por ĉi tiu granda bestogrupa, kiu adaptiĝis al la vivado sur aŭ en la tero.

La korpo de la lumbriko estas iom pli pinta antaŭe kaj ofte iom plata malantaŭe. Sur ĉiu ringo troviĝas 8 mallongaj, fortikaj haregoj aŭ *ĥetoj*, kiujn oni povas senti se oni palpas la korpon de malantaŭe antaŭen laŭ la ventro aŭ laŭ la flankoj. Je kelka distanco post la antaŭaĵo la plenkreskaj bestoj havas iom pli dikan regionon, la *zonon* aŭ *klitelon*, kie la haŭto estas aparte riĉa je glandoj. La buŝon oni trovas ĉe la pinta antaŭaĵo, kaj super ĝi troviĝas malgranda, rondca *kapeto*, kiu servas kiel speco de supra lipo. La anuso troviĝas sur la lasta segmento. La tuta korpo estas kovrita de mal-dika haŭto, sub kiu troviĝas tavolo da muskoloj kiu faras la bestojn tre moviĝ-kapablaj. La lumbriko havas bone evoluintajn sangosistemon kaj nervosistemon, kaj al la digesta kanalo apartenas i.a. muskola stomako.

En Norvegujo la lumbrikoj povas atingi longon de 20-30 cm, sed en pli sudaj landoj ili povas fariĝi multe pli longaj. Impresas preskaŭ nekredible, kiam oni aŭdas pri la *aŭstralia gigantlumbriko*, kiu atingas longon de 3,5-4 m kaj estas dika kiel homa dikfingro!

Ĉiu, kiu iom pli atente observis la lumbrikojn, certe rimarkis ke ili povas esti sufiĉe diversaj, kaj laŭ granda kaj laŭ koloro. Efektive ni havas en Norvegujo 6-7 diversajn multe disvastiĝintajn speciojn kaj krome kelkajn malpli ordinarajn speciojn. La plej facile rimarkebla diferenco estas ke kelkaj specioj estas ruĝecaj aŭ brunecaj, aliaj pli-malpli grizaj.

Antaŭ ol transiri al la agado de la lumbriko en la tero, mi tute mallonge